

LA DIO DE LA MALNOVA TESTAMENTO

Multaj homoj emas malatenti la Malnovan Testamenton pensante, ke la Dio de tiu epoko estas severa kaj malkompleza Dio, kiu punas la homojn senkompate. Ĉu li ne ordonis la armeon de la Izraelidoj mortigi la popolojn en la lando, kiun li donis al Izrael, eĉ virinoj kaj infanoj? Ĉu li ne punis severe tiun elektitan nacion tiel, ke nur malmultaj restis? Estas malfacile kompreni kiel tia primitiva koncepto de tia militista Dio povas akordi kun la amanta Patro de la Nova Testamento.

Ĉi tiu problemo ĝenas multajn homojn kaj ofte forpuŝas ilin for de la kristanismo. Por solvi ĝin iuj emas supoziti, ke Dio ne vere ordonis la mortigon de reĝoj, popoloj aŭ nacioj; la sugesto estas, ke la Izraelidoj mem pensis, ke necesas detruo la malamikojn. Oni eĉ sugestas, ke Dio ne fakte ordonis, ke Abraham oferu Isaakon kiel bruloferon sed, ke Abrahamo nur supozis, ke tio plaĉus al la Eternulo. Ni zorge pripensu ĉi tiun ideon.

Prenu do vian Malnovan Testamenton kaj elŝiru (mense!) ĉiujn partojn, en kiuj Dio klare ordonis, ke la Izraelidoj detruu la malpiajn loĝantojn en la promesita lando. Vi devos forigi ankaŭ Gen. 22:2 kaj 1Sam.15:3, kaj supozeble v.10-26 kie Dio malaprobis Saulon pro tio, ke li ne tute detruis la Amalekidojn. Ne forgesu tiujn batalojn dum la tempo de la Reĝoj, kiam la Eternulo konsilis la nacion kiel fari la batalon kaj helpis ilin sukcese venki siajn malamikojn, ekz. Gideon kaj Jehoŝafat. Multaj el la Psalmoj kaj profetaĵoj ankaŭ mencias tiujn okazaĵojn, do necesas forigi tiujn partojn Nu, kiom da truoj vi nun havas en via Malnova Testamento? Eble ne plaĉas al vi tiuj rakontoj pri la miraklaj punoj, kiujn Dio mem faris per la diluvo kaj kontraŭ Sodom, do ni devas elŝiri eĉ pli. Ĉu tio el la Libro, kiu nun restas povas esti kredinda? Evidente ne. Plue, se vi forĵetus tiom da la Malnova Testamento vi samtempe subfosas la Novan ĉar ĝi dependas de la Malnova. Jesuo kaj la apostoloj evidente kredis tiujn Skribojn kaj ofte citis ilin. Ne, ni devas aŭ akcepti la tutan Bibliion aŭ malakcepti la tutan; ni ne povas elekti nur partojn ĉar ĝi staras kompleta.

Kiel do ni povas kompreni la ŝajnan kontraŭdiron inter tiuj tempoj antaŭ Kristo kiam la malamikoj devas esti detruitaj, kaj la ordono de Kristo, ke ni devas ami niajn malamikojn? Ni scias, ke Dio mem ne ŝanĝiĝas: "*Mi, la Eternulo, ne ŝanĝiĝas ...*" (Mal.3:6), tial devas esti, ke la homoj ŝanĝiĝas. Mi pensas, ke la solvo de ĉi tiu problemo estas, ke Dio en sia bonkoreco kaj kompatato pritraktas la homojn laŭ ties kapablo kompreni. Li scias, ke la homoj ofte miskomprenas, tial li komencis pritrakti ilin laŭ tiu nivelo en kiu ili tiutempe estis, kaj gvidis ilin antaŭen kaj supren, for de la fizika, natura nivelo al la spirita nivelo, pli proksima al si mem.

Tiel en la tempo de la patriarkoj kaj dum la periodo de la Izraela nacio ĉiuj homoj pensis, ke iu dio montras sian aprobon per venko de malamikoj kaj provizo de materialaj benoj - riĉoj, granda familio, multe da bestoj ktp. Kiam la Eternulo elvokis Abramon li promesis al li riĉaĵojn pro lia fido. Simile por la Izraelidoj Dio provis instrui ilin dum jarcentoj ke, se ili obeus, ili ricevus helpon kaj benon. Pro tio Paŭlo nomis tiun epokon "*la tempoj de nesciado*" (Ag.17:30) kaj klarigis, ke "*... la leĝo (de Moseo) ... estis aldonita kaŭzo de eraroj ... la leĝo fariĝis nia pedagogo, kondukante al Kristo ...*" (Gal.3:19-29)

Kiam Jesuo venis ĉio ŝanĝiĝis; komencis nova epoko sub nova interligo en kiu la benoj estas spiritaj, ne materialaj, kaj la malamiko estas la peko. Jesuo klopodis klarigi tion al siaj disĉiploj, kiuj pensis, ke se homo estas riĉa sekvas, ke tiu estas piulo. Ili supozis, ke Jesuo savos la nacion el la manoj de la Romanoj, kaj estis por ili malfacile kompreni, ke la kristana batalo devas esti kontraŭ sian propran, naturan emon fari sian propran volon anstataŭ ol la volo de Dio. Poste Paŭlo klarigis, ke *"nia luktado estas ne kontraŭ sango kaj karno, sed kontraŭ regantoj ... la spiritoj de malbono ..."* (Efes.6:12) Kiam la disĉiploj disputis kiu el ili estas la plej granda, Jesuo tute renversis la tiaman pensmanieron kaj klarigis, ke la ĉefa inter ili devas esti servanto. (Lk.22:24-27) Ni do ne juĝu la aferojn de la Malnova Testamento laŭ la kristana normo.

Tamen eĉ en la Malnova Testamento troviĝas indikoj, ke la Eternulo ne vere estas tia, kian la popoloj ĝenerale pensis. Kiam la Eternulo montris sian gloron al Moseo, li proklamis sin *"... indulgema kaj kompatema, multpacienca, favorkora ..."* (El.34:6-7) Al Jeĥezkel li diris *"Ĉu mi deziras la morton de malpiulo? ... konvertu vin kaj vivu."* (Jeĥ.18:23-32) Ĉu povus esti pli kortuŝaj vortoj ol tiuj en Hoŝea 11 kie Dio esprimis siajn sentojn pri la nacio kiun li amas:

"Kiam Izrael estis junulo Mi lin ekamis ... Mi tiris ilin per ligiloj de amo ... kiel Mi protektu vin ... varmegiĝis mia tuta kompatato. Mi ne agos laŭ mia flama kolero ..."

Li penis moligi la naciisman koron de Jona, ŝajne malsukcese, okaze de la pentado de la Ninevanoj. Pere de Jesaja li diris al la Izraelidoj, ke li ne akceptos iliajn bruloferojn pro tio, ke ili donis hipokritike (Jes.1:11-20). Ĉiam li penis instrui ilin, ke la grava afero estas la koro, la spirita pensmaniero. La reĝo David montris pli profundan komprenon kiam li skribis:

"... Vi ne deziras oferdonon, alie mi ĝin donus; brulofero ne plaĉas al Vi. Oferdonoj al Dio estas spirito suferanta; koron suferantan kaj humilan Vi, ho Dio, ne malŝatas." (Ps.51:16-17)

La Eternulo do, pritraktis la homojn de tiu frua epoko kvazaŭ infanoj, per simplaj rekompencoj kaj punoj, sen nun ni kristanoj devas esti pli kiel plenkreskuloj. Pro la instruo kaj ekzemplo de la Sinjoro Jesuo ni povas pli bone kompreni, ĉar li montras al ni tian, kia estas Dio. La malamikoj de Dio ja fine estos detruitaj, sed ne per la milito. Nia glavo estas la Vorto de Dio (Efes.6:10-18), do ni devas klopodi savi ilin per tiu vorto, predikante al ili la evangelion. Tiuj, kiuj rifuzas fine pereos per la 'glavo', kiu eliras el la buŝo de Jesuo (Apok.19:15)

Kaj la benoj spiritaj? Dio proponas al ni la *"riĉo de lia graco"*, kiu estas la pardono de niaj pekoj (Efes.1:7) kaj *"la riĉo de la gloro de Lia heredaĵo"* (v.18) *"ke vi estu potence fortigitaj ... per Lia Spirito: por ke Kristo loĝu en viaj koroj"* (3:16-17); *"... Kristo en vi, la espero de gloro."* (Kol.1:27) Unuvorte, *"la donaco de Dio estas eterna vivo en Kristo Jesuo nia Sinjoro."* (Rom.6:23)

Ĉu tio ne estas pli valora ol io ajn alia riĉo? La oro de Salomono, la gregoj de Abraham kaj la tuta havaĵo de la Izraelidoj jam pereis sed la trezoro de vera kredanto estas *"... en la ĉielo, kie nek tineo nek rusto konsumas, kaj kie ŝtelistoj nek trafosas nek ŝtelas ..."* (Mt.6:19-21) La vera riĉo de la paco, kiun ni per fido havas kun Dio per nia Sinjoro, restas eterne. (Rom.5:1)

Jean Field